- Grosjean-Maupin : La monhelpe decidita en la membrokunveno 2011, je po 1€ membre (entute 591 €), estis ĝirita al Nordfrancia Federacio.
- Landa kongreso
 - en 2012, ĝi okazos de 25a ĝis 29a de majo en Saint-Aignan-Grandlieu apud Nantes.
 - en 2013, komuna kongreso kun fervojistoj (IFEFF), en Artigues apud Bordojo de la 4^a ĝis 12^a de majo 2013.
- Komuna datumbazo : post la komitata decido en Sète, UFE kaj SAT-Amikaro ellaboris komunan datumbazon pri kluboj, kursoj kaj eventoj. Tiu datumbazo estas uzebla kaj facile ĝisdatigebla per la retejo de UFE. Al la federacioj kaj kluboj eblas enigi la ĝisdatigojn en siajn



retejojn.

- La kalendaretojn JEFO ĵus eldonis. Robin Guinin desegnis la bildon.
- "Projekto 125" : temas pri projekto starigi retkurson 125-lectionan, en 125 tagoj.
- Nova lernolibro : por la venonta komitatokunsido, la komisiono por nova lernolibro proponos unuan lecionon reviziitan de "Metodo 11" kaj ekadapto de metodo "FLE".
- Flagoj de UFE jam alvenis en Parizo, kostas 12 € unuope kaj po 10 € kvinope.
- DVD E@I : Senditaj per Eurolines-buso, ricevitaj.
- Fokuso pri la KER-ekzamenoj (subvencio kaj informoj al instruantoj) Malpli ol 10 homoj petis tiun subvencion. Por ricevi ĝin, la petanto sendu la ekzamenkotizan kvitancon al la sidejo. En aprilo 2012 devus okazi KER-ekzamenosio en Grésillon. UFE subtenas la FEI-ekzamenojn kaj instigas al preparo kaj trapasado de ili. Cyrille Hurstel verkos artikolon pri FEI ekzamenoj por la venonta numero de LME, 580.

- Fokuso pri la Interfederacia Konferenco

1°/ Federaciaj bultenoj. Propono, ke en la retejo de UFE (fako pri federacioj) estu enretigitaj la Federaciaj bultenoj laŭ la formato PDF aŭ ligiloj al ili. La sekretarioj (Aleks Kadar kaj Véronique Bichon) kolektu la bultenojn de la federacioj por enretigo.

2°/ Kunlaborkontraktoj inter UFE kaj la federacioj. Xavier Dewidehem kaj Xavier Godivier estas taskitaj por proponi venontkunsido modifon de la interna regularo por anstataŭigi la nunajn kunlaborkontraktojn.

3°/ Dormantaj federacioj. La Konferenco proponas, ke iu klopodu instigi estiĝon de regiona movado/federacio el la lokaj kluboj kaj individuoj. Ĝi sugestas, ke tiucele pri Normandio zorgu R.Coquisart, pri Luarlandoj Xavier Godivier, pri Akvitanio Guy Camy, pri Centro Axel Rousseau.

Sekva Komitatokunsido dimanĉon la 22an de januaro 2012

Aleks Kadar

Novaĵoj de Bouresse

Kvinpetalo : impresoj de staĝantoj

Altnivela traduko, gvidita de Brian Moon :

La staĝo «altnivela traduko» estis por mi tre utila, ĉar ĝi plibonigis mian scipopon de la lingvo. Mi konscias, ke mi devos ankaŭ multe labori por atingi bonan nivelon, sed mi ne malesperas. Fakte, la esperanta lingvo ne estas tiel facila, kiel oni tion asertas...

Ĉie kaj ĉiam estas organizataj staĝoj je la 1a kaj 2a grado. Poste gravan mankon renkontas esperantistoj : ĉu ili havas okazon multe vojaĝi kaj tiel partopreni en internaciaj kunvenoj; ĉu ili restas hejme kun libroj, ĵurnaloj ktp. Hodiaŭ, la reto bonŝance donas interesajn rimedojn por havi kontaktojn kun la movado, tamen,

tio ne anstataŭas altnivelajn staĝojn.

Roger Condon

Malkovru originalan Esperanto-literaturon

En oktobro sinjorino Anne Jausions, diplomita en la universitato de Poznan, gvidis kurson pri esperanta literaturo en Kvinpetalo. La kursanoj konatiĝis kun la majstroj de la verda plumo helpe de citaĵoj, enciklopedioj, interreto kaj Edukado.net. Ĉiu ankaŭ prezentis libron elektitan de si mem. Oni multe diskutis pri la verkoj, verkistoj, stilo kaj vortoj.

Kvinpetalo estas unu el la ne tro multaj lokoj, kie oni povas konsulti grandan libraron, de kio la kursanoj profitis, elti-

rante de la bretoj verkojn post verko. La finon de la kurso kronis kvizo, kiu montris, ke la tereno de la originala literaturo en Esperantujo estas vasta kaj varia, ne sufiĉe esplorata de esperantistoj mem. La kursanoj enpenetris tiun terenon kun ĝuo kaj intereso. Grandan dankon ni ŝuldas al la gvidanto, kiu lasis nin sufiĉe libere vagi en ĝi.

Raita Pyhala, Finnlando

Stage de musique et d'espéranto à Bouresse

Une dizaine de personnes participaient au stage, du 16 au 24 août 2011 dans le Centre culturel espérantiste « Kvinpetalo ». Chaque année, la famille Markov organise ce stage qui convient aux

Eĥoj de kutima evento en Bretonio

Plouezec : 15^a eldono

De la 13^a ĝis la 20^a de aŭgusto 2011 okazis Esperanto-renkontiĝo en Plouezec. Al tiu bretona urbeto alvenis ĉirkaŭ 120 esperantistoj.

Plej juna estis 5-jara ĉinino, plej maljuna la 91jara bretonino Gaby Tréanton. Plej multaj estis bretonoj, estis aliaj francoj kaj kelkaj aliaj franclingvanoj. Venis ankaŭ 18 ĉinoj, sed plejparte ili estis komencantoj, do ne eblis konversacii kun ili. Nur la gvidantoj de la kursoj kaj atelieroj estis ĉefe alilandanoj. Por preventi krokodiladon organizanto disdonis dum la manĝoj nepalajn ĉapojn, kiujn pluezekaj esperantistoj akiris ĉe Esperanto-aranĝo en Nepalo. Pri tiu, kiu havis sur sia kapo nepalan ĉapon, oni faris, kvazaŭ li ne plu komprenus la francan, se li estis franco, aŭ la ĉinan, se li estis ĉino. Oficiale li plu komprenis nur Esperanton kaj la nepalan. Do oni nepre devis alparoli lin en Esperanto. Sed multaj neglektis tiun regulon

kaj tamen alparolis lin en la franca. Estis sufiĉe multe da krokodilado, iuflanke inter la francoj, aliflanke inter la ĉinoj.

Mi alvenis en la stacidomo de Paimpol en la posttagmezo de sabato la 13^a. Organizantino atendis min kaj hungaran kursgvidontinon kaj kondukis nin al la pluezeka festosalono, kie okazos la aranĝo. Mi ricevis la programon kaj nomŝildon. Sur la ŝildoj la personaj nomoj estis skribitaj pli grande ol la familiaj nomoj. Tion mi trovis simpatia.

Mi estis loĝonta kun 3 ĉinoj en la domo de pluezeka paro, atingebla de la festosalono per malpli ol duonhora piedirado. Aliaj ĉinoj loĝis ĉe najbaroj de tiu paro. En la sabato organizanto veturigis nin al niaj gastigontoj. Tio estis oportuna, ĉar pluegis... Poste organizanto nin revetu-

rigis al la festosalono kaj mi partoprenis en la unua ateliero : senŝeligado de bretonaj fazeoloj. Vespere venis la urbestro por inaŭguro. Li plurfoje venis al ni dum la aranĝo kaj mi trovis lin simpatia. Ni trinkis verdan aperitivon, bedaŭrinde alkoholan.

En la dimanĉa mateno mi piediris al elementa lernejo por la unua kurso. Mi estis en la babilkurso de Barbara Pietrzak. Temoj de la babilado estis en tiu semajno : identeco; manipulado;



musicien et/ou espérantistes, quel que soit leur niveau ou leur instrument (voix, flûte...).

L'ambiance y est extrêmement conviviale et le prix peu élevé, parce que tous participent pour mettre et débarrasser la table, laver et essuyer la vaisselle. Remercions Jacqueline M. et Geneviève G., les deux bénévoles qui ont fait toute la cuisine.

Chaque stagiaire avait beaucoup de temps libre pour travailler, discuter, ou se reposer. Il devait seulement assister à 1 h 30 de « cours » le matin et 1 h 30 de travail des chants communs l'après-midi. Le matin, les plus forts en espéranto écoutaient Vinko Markov exposer le contexte des cinq chants communs, l'évolution des espèces, la biologie ... pendant que Anne-Sophie Markov traduisait aux autres les textes de ces

chants, avec une pincée de grammaire et quelques devoirs facultatifs pour le lendemain. L'après-midi, neuf stagiaires travaillaient ensemble cinq chants: deux d'origine balkanique, un traduit du néerlandais, un du français de la Renaissance et une composition originale sur un air irlandais, sous la direction de Lino Markov, frère de Vinko. Pendant les temps libres, Lino faisait travailler deux, trois ou quatre flûtes à bec de différentes hauteurs de son et deux chanteurs isolés, qu'il accompagnait à l'accordéon ou à la guitare.

Lino a donné un concert public de guitare dans la salle municipale de Bouresse. Les stagiaires ont joué dans le Centre culturel espérantiste, où une dizaine d'habitants sont venus les écouter: cinq chants à trois voix (pas de ténor!) accompagnés par Lino à

la guitare, quatre ou cinq morceaux à plusieurs flûtes, dont deux sud-américains. Et La mauvaise réputation, de Georges Brassens, traduite – au dernier moment – en espéranto. Le public nous accompagnait, en français, pour cette chanson.

Une journée de repos a permis de visiter Civaux, ses vestiges mérovingiens, son élevage de ... crocodiles, mais pas sa centrale nucléaire. Celle-ci produit un nuage blanc toujours visible, car il a fait beau temps.

Venez l'an prochain – ce sera probablement en juillet – avec votre instrument ou votre organe vocal, même si vous ne lisez pas les notes, même si vous débutez en espéranto. Vous ne le regretterez pas, car l'ambiance y est vraiment excellente. Vous ferez une cure de rire...

Jacques CAUBEL

interreto; superstiĉoj kaj antaŭjuĝoj; ni, la mondo kaj Esperanto; informado pri Esperanto. Barbara enkondukis la temon. Poste ni ĝin pridiskutis en grupetoj. Fine de la mateno ĉiu grupeto raportis por fari komunan konkludon.

En la dimanĉo post la tagmanĝo ni buse veturis al Paimpol por la festivalo



de maristaj kantoj. Bonŝance brilis la suno. La festivalo okazis en la haveno. La ĉi-jara temo estis keltaj kantoj. Estis pluraj scenejoj kaj kantistoj kantis ankaŭ sur la kajoj de la haveno.

En la lundo komenciĝis la regula programo. Matene estis kursoj. Post la tagmanĝo estis promenadoj. Je la 17a horo estis atelieroj en la lernejo. Post la vespermanĝo estis vespera aranĝo en la festosalono.

Ek de la mardo mi regule partoprenis en la aktivadoj. Mi partoprenis tri ekskursojn: al la abatejo de Beauport, al la kapelo de Kermaria (kie estas desegnita mortodanco). Poste ni vizitis la templon de Lanleff. Mi vizitis ankaŭ la belajn ĝardenojn ĉe la kastelo de La Roche-Jagu.

Estis proponataj diversaj atelieroj : ajurveda medicino, kun la barata doktoro Ranga, keltaj desegnoj, kantado, teatro, joko, informadiko. Mi aliĝis al la teatra ateliero gvidata de Laurent Peuch. Ni faris prononcekzercojn. Problemo mia estas, ke mi mispronocas la literon R. Sed, ĉar de 42 jaroj mi fuŝpronocas Esperanton, tiu eraro estas malfacile korektebla. Ni pretigis skeĉon de Stefan MacGill por la adiaŭa vespero.

En la lunda vespero mi iris dormi anstataŭ partopreni en la bretonaj dancoj. Sed en

postaj vesperoj mi restis en la festosalono. Mardon Ranga prelegis pri hodiaŭa Barato. Li insistis pri la rolo de virinoj en la disvolvado de la lando. Merkredon pluraj staĝantoj kantis kantojn el siaj regionoj aŭ landoj. Ĵaŭde estis prelego pri Ĉinio. La franca publiko trovis, ke estas prezentata la oficiala vidpunkto de la ĉina ŝtato. Tial ne estis multaj demandoj. Vendredon la programon finis la adiaŭa vespero. Estis kantoj kaj diversaj aliaj prezentadoj. Nia ateliero prezentis sian teatraĵon. La publiko estis indulgema kaj nin aplaŭdegis. La lasta prezentado estis tiu de la kuiristinoj : ni tiam malkovris, ke ili estas diablinoj, kiuj kuiras abomenaĵojn. Tamen dum la semajno ni trovis la manĝojn bongustaj.

La etoso en Plouezec estis tre amika kaj simpatia, sed ne vere internacia. Tiun aranĝon mi rekomendas al franclingvaj komencantoj aŭ progresantoj, kiuj bezonas unuan paŝon antaŭ ol partopreni en vere internacia Esperanto-aranĝo.

Jacqueline Lépeix

Maison culturelle espéranto de Baugé

Grésillon : un été bien rempli

Après avoir résolu quelques problèmes bloquants, la MCE, Maison Culturelle de l'Espéranto, s'attaque aujourd'hui à un vaste programme de rénovation. Dès les premiers mois de 2011, nous avons, notamment, fait mettre du chauffage électrique dans les chambres et créé deux nouvelles douches. Un des prochains projets est de réhabiliter au moins en partie le deuxième étage, par l'adjonction d'un nouvel escalier.

L'année 2010 a été bénéficiaire et pour que les suivantes le soient également nous devons augmenter la fréquentation et allonger la durée d'utilisation. Pour 2011, nous avons déjà dépassé dix semaines d'occupation, mais en acceptant de louer à des non-espérantistes. Ainsi, du 4 au 17 juillet, la colonie de vacances REVS a accueilli une vingtaine d'adolescentes pour un programme artistique. Les quatre semaines de stages organisées par la MCE elle-même avaient chacune sa spécificité : la première (17 – 23 juillet), pédagogique, proposait notamment un séminaire : « l'espéranto dans l'enseignement officiel » et des examens d'espéranto. La seconde, pendant le Congrès Mondial d'UEA, était une semaine alternative : cuisine végétarienne, vélo, présentation de la médecine naturelle indienne... La troisième (30 juillet – 6 août), semaine touristique, incluait six excursions l'après-midi et un cours de français pour



étrangers. Enfin, la quatrième (15 – 24 août), semaine festive de neuf jours, avec ses activités récréatives en famille, guitare et improvisation musicale, masques, origami, reliure... reçut la visite de vingt Chinois. Bien évidemment deux ou trois niveaux de cours d'espéranto étaient prévus chaque semaine, ainsi que plusieurs autres activités : yoga, théâtre, danse, chant, c o n c e r t s , conférences, etc...

D u r a n t ces quatre semaines, 150 espérantistes dont quelque 25 bénévoles

sont venus au total 800 journées. Mais c'est sans compter d'une part FESTO, organisé par Espéranto-Jeunes et Vinilkosmo, qui a réuni à Grésillon une centaine de jeunes espérantistes du 8 au 15 août, d'autre part l'université d'été d'EDE (Europe Démocratie Espéranto), du 2 au 4 septembre, avec plus de trente participants. Fin août, 43 lycéens de 13 à 18 ans, sélectionnés parmi plus de 150

candidats, encadrés par 8 « animatoux », ont suivi le traditionnel stage Animath de préparation aux olympiades de mathématiques.

Si l'on commence à mettre en pratique la politique d'ouverture, visant, pour mieux financer nos projets, à accueillir également une clientèle non espérantiste, Grésillon reste avant tout la Maison

Culturelle de l'Espéranto et nous remercions les quelque 300 espérantistes qui ont pro-



fité du château cet été ainsi que tous les bénévoles sans qui nous n'aurions pu fonctionner...

François Lo Jacomo





Ĉu manĝenda muziko?

Foto: Ivo Miesen

« Kazonoj devenaj de ekologia terkultivado » ! Jen la propono de Guillaume (Gijom) Armide al la organizantoj de franclingvaj festivaloj pri ekologio, daŭripova evoluigo, aŭ iu ajn kultura okazaĵo. La titolo misteras... nu, ni legu la klarigan subtitolon: « Koncerenco por savi la homaron... aŭ ne! ». Ĉu pli klare?... Ne vere ! Eĉ pli mistere ! Kion signifas « koncerenco »? Ĉu temas pri mistaĵo ? Nu, sufiĉas la nebulaĵoj ! Ni klarigu ĉion ĉi !

Guillaume pianludas ekde la 8-jara aĝo. Kelkajn jarojn poste, li ekverkas kanzonojn, en kiujn li elverŝas siajn sentojn, rakontojn, pensojn, kiel ĉiu artisto. Tamen, ŝajnas al li, ke senco mankas... « Kial mi tedu la homojn pri mia vivo, kiu similas al ies vivo ? » La respondo venos, kiam lian vivon frapos la konscio pri la necerta evoluo de la planedo kaj de ĝiaj loĝantoj. Du urĝaĵoj venas

al lia menso : profesiiĝi pri daŭripova evoluigo kaj... lerni Esperanton ! (Kiel Esperanto povas savi la homaron, tion li klarigos en alia spektaklo, sed ni ne ĉion prirakontu samtempe !) Dum li tiojn faras, li daŭre pianludas kaj verkas. Pli kaj pli, liaj kanzonoj enhavas novan sencon ! Ĉu per siaj temoj, ĉu per sia lingvo, ili portas pli kaj pli klaran mesaĝon. Guillaume laboras en asocio pri daŭripova evoluigo. Paralele, li frekventas esperantajn renkontiĝojn kaj proponas siajn koncertojn tie. « En Esperantujo, oni petas min kiel kantiston, kvankam en la cetero de la mondo, mi devas altrudi min kiel malamikon ! Kial mi altrudus min ? Mi nur pace kantemas miajn sentojn, mi volas devigi neniun aŭskulti min ! Sed en Esperantujo, homoj kaj organizantoj diras « venu kanti por ni ! » Ili eĉ pagas pro tio ! Frenezuloj ! ».

Alkanti kaj alparoli la spektantaron

Tiel Guillaume ekmalkovras la plezuron alkanti spektantaron. Alkanti kaj...

alparoli ! Ĉar Guillaume ne kapablas prezenti kanzonon sen paroli pri ĝi, pri la kialo, la kielo, la kiamo... nu la tuta kondiĉaro, pensaro, emociaro kiuj naskis ĝin. Liaj spektakloj estas tute ne nur muzikaj. Kaj pli kaj pli lin tiklas la ideo, fari same en la franca por la franclingvanoj ! Li pensas, ke li povus prezenti siajn novajn kanzonojn, kiuj desegnas la vojon sekvitan de lia pensaro kaj sentaro ekde kiam li ekkonsciis pri la minacoj kiuj ŝvebas super la homaro. Tamen, li pensas « Mi nepre volas ne nur kanti sed rakonti. Mi volas helpi la





Foto: Sferracavalli

homojn plibone priatenti miajn kanzon-tekstojn per enigo de tiuj en tuta parolado. Mi volas fari kvazaŭ koncerton, kiu samtempe estus konferenca prelego. Mi volas fari... KONCERENCON. Tiel naskiĝas la unua koncerto de Guillaume: « Kanzonoj devenaj de ekologia terkultivado » (Chansons issues de l'agriculture biologique). Ofte la homoj imagas, ke tiuj kanzonoj temas pri ekologia terkultivado. Ne estas tiel. La kanzonoj estas ne pri sed ja devenaj de ekologia terkultivado. Nekompreneble, ĉu ? Nu, tio simple signifas, ke ili kreskis el sana tero, sen ĥemiaj

aldonaĵoj ! Tio signifas, ke ili estas simplaj elkoraj krioj. Ili ne sekvas modon, ili ne strebas konvinki, ili ne klarigas pri io ajn, ilin ne plibonigis teĥnikistoj, ili ne estas kalibrigitaj por bele aspekti sur la bretaro de la ĉiovendejo... ili estas naturaj !

Guillaume sin apogas sur la verkaĵoj de franclingvaj nuntempaj homaranistoj

Tamen tio ne diras pri kio ili temas. Ĉu vi vere deziras scii ? Ne maltrankvilu, la enhavo estas tre sana nutraĵo por via menso kaj tre bongusta por via koro ! Kelkaj temas pri terkultivado, estas vere, sed aliaj temas pri mono, laboro, amo, solidareco, Esperanto, komunikado, utopioj... Kaj ofte, Guillaume sin apogas sur la verkaĵoj de franclingvaj nuntempaj homaranistoj kiaj Pierre Rabhi, Claude Piron, Patrick Viveret, Dominique Guillet, Albert Jacquard...

Jam deko da prezentoj

Kaj Guillaume plenumas sian promeson, li ne nur kantas sed multe teatrumas

inter du kantoj.

La spektaklo ekzistas de kelkaj monatoj. Ĝi jam spertis dekon da bonaj prezentoj fronte al malsamaj spektantaroj kadre de festoj aŭ festivaloj organizitaj en Francio pli malpli rilataj al ekologio. Nun, Guillaume devas labori (li malŝatas tion !) por pli konatigi ĝin. Bonŝance, li ne estas sola sed subtenata de bona teamo de volontuloj, kiuj kredas je li. Se ankaŭ vi opinias, ke vi havas eblecon fari ion ajn eĉ malgrandan por helpi konatigi la kanzonojn devenajn de ekologia terkultivado (nur en franclingvujo ĝis nun !) ne hezitu proponi vian helpon al Guillaume, chansons.ab@gmail.com.

Sciu ankaŭ ke, en St-Aignan de Grand Lieu, okaze de la kongreso de Esperanto-France, okazos du koncertoj de Gijom !

La spektaklo estas ludota en Montreuil, apud Parizo ĉiudimanche vespere de februaro kaj marto. Pli da informoj troveblas en la portempa retpaĝaro : <https://sites.google.com/site/chansonsbio>



Foto: Christiane Reynaud

Rêverie - Revado

Mi malkovris la grupon Rêverie/Revado en la UK 2011 en Kopenhago. Mi multe ŝatis la koncerton. La nova duobla KD proponas unu diskon en la itala kaj unu en esperanto. La grupanoj mem ne estas esperantistoj sed laboris por tiu programo kun la itala esperantisto Andrea Fontana. Delonge la grupo kutimas kanti en pluraj lingvoj, ĉefe de la mediteraneaj landoj. La ĉefa voĉo de la grupo estas Fanny Fortunati. La muzikstilo de la grupo nomiĝas « progresiva », aŭh « etnoprogresiva ». Mi kutime aŭskultas klasikan kaj malnovan muzikon de la tuta mondo kaj mi rimarkis la miksitan influon de pluraj folkloraj ritmoj kaj harmonioj. Mi sentas ankaŭ la influon de la mezepoka festmuziko. Rêverie miksas akustikajn kaj elektronikajn muzikinstrumentojn: transversa fluto, mandolino, klarneto, diĝeriduo, klavaroj, gitaroj, efektiloj. Mi multe ŝatas la rezulton, plena de energio kaj de vojaĝo. Mi rekomendus aŭskulti tiun diskon matene kiel bonegan stimulilon. La esperantaj titoloj sur ĉi tiu disko: La tradezerta komercisto, Kiam alvenos la fino, Arkana belulino, Plurmiljaraj knaboj, Danco de l'maro, Plurestantaj memoroj, Koto kaj lumo, Pluvas rosma-reno, Silkvojo, Oceano.



Mia preferata kanto estas "Koto kaj lumo", pro la poeta kaj iomete filozofa teksto: "Estas profunda la kono kiun mi havas pri l' Kosm', tre multe iam scias mi, sed en ĉi mirinda leĝaro, substanco de l' Univers', ĉu la liber' estas nur rev'?" Kun la duoblo KD, libreto prezentas la tradukon de la kantoj en la itala, esperanta kaj angla.

Oni trovas kompletan informon sur interreto, kun bildoj, filmetoj kaj sono, sur Ipernity www.ipernity.com. Oficiala retpaĝo de la grupo www.reverieweb.com

Marc Meyer

La KD aĉeteblas ĉe Vinilkosmo www.vinilkosmo.com.



Interkant' en Bouresse

Dum tri jaroj mi kantis kun granda plezuro kaj emocio la «Gheneralan kanton» de Neruda/Theodorakis kun Interkant' en diversaj landoj kaj regionoj. Kiam mi eksciis, ke la aventuro daŭros, mi senhezite decidis partopreni en la nova projekto kaj kia projekto ! La opero «Karmen», certe nur ekstraktoj, sed sur scenejo, kiel veraj artistoj !

La 11an, 12an kaj 13an de novembro, ĉirkaŭ 45 gekantistoj, junuloj, maljunuloj kaj eĉ infanoj kunvenis en la esperantista centro Kvinpetalo en Bouresse por prilabori la unuan akton de la opero kun la Ĥhorestrino Franjo kaj kun la enscenigistino Monique.

La vetero estis tiel klara kiel nia menso, la farboj de la arbofolioj gajigis nian koron. Ni bone loĝis en Kvinpetalo, la manĝoj estis simplaj sed viglaj, ĉiuj ĝoje helpis kaj vespere ni rigardis diversajn interpretaĵojn de la opero.

La kantoj estas ja malfacilaj, sed la bonhumoro kaj la atento de ĉiuj, la preciza kaj postulema gvidado de Franjo kaj de Monique, kiuj sciis doni fidon en ni mem por moviĝi sur scenejo, permesis dimanĉe posttagmeze kanti sen tro da malĝustaj notoj antaŭ kelkaj loĝantoj de la vilaĝo, kiu disponigis al ni la festosalonon por niaj provludoj.

Ĉiuj estas nun pretaj por studi hejme kaj daŭrigi la sperton en majo, tiufoje en Grezijono.

Kiuj ŝatus veni kun ni? Ne timu!

Se ne, ni esperas vidi vin en aprilo kaj junio 2013 dum la unuaj prezentadoj! Olé !

Lucia kaj Fanny, Brive La Gaillarde korusanoj en Interkant'



Kultura Vojaĝo al Vjetnamio

En la retejo Edukado.net ekfunkciis dudekleciana reta kurso pri Vjetnamio, kompilita de Nguyen Xuan Thu, konata vjetnama esperantisto kaj redaktita de Katalin Kováts. «Kultura vojaĝo al Vjetnamio» celas helpi la partoprenantojn de la venontjara UK en Hanojo anticipi informiĝi pri la kulturo de la kongreslando, kompreni ties historion kaj kutimojn. Aliflanke ĝi donas eblon almenaŭ por virtuala vojaĝo ankaŭ al tiuj, kiuj ne havas la rimedojn mem partopreni la kongreson.

Pli da informoj : katalin@edukado.net - www.edukado.net/klerigejo



Voler avec des cacatoès...



Elmarou entendit des commé-
rages sur les succès de son favori
Yangabara et il décida qu'il était
temps d'en faire un véritable Banoubi. Il
envoya un message pour que le garçon
vienne sans sa mère jusqu'à une certaine
cascade. En même temps, les autres jeunes
Banoubi recevaient un appel similaire. Ce
n'était pas un secret, mais personne n'en
parlait à haute voix, les jeunes se soumet-
traient à l'initiation et ensuite seraient de
vrais hommes.

Les garçons n'atteignirent jamais la
cascade. Sur leur chemin, on leur tendit
une embuscade symbolique et chacun fut
conduit de son côté par un homme jusqu'à
une partie plus éloignée du territoire
Banoubi. Ce qui suivit fut à la fois terrible
et excitant.

Yangabara ne fut pas amené par Elmarou
mais par un homme plus âgé nommé
Ngourole, à la toison grise aussi bien sur
la tête, le visage que la poitrine. Ngourole
avait été choisi avec soin par Elmarou. Il
portait le titre officiel et honorifique
d'Ancien, mais il n'appartenait pas à
ceux qui voyaient en Elmarou un rebelle
dangereux – et Elmarou ne lui avait jamais
volé de femme. De plus Ngourole pouvait
se souvenir de chants interminables d'une
grande variété et on le respectait beaucoup

pour sa profonde connaissance des ensei-
gnement des Anciens. Ngourole n'était pas
un grand combattant, mais Elmarou savait
que Yangabara n'avait pas besoin de leçon
à ce sujet.

Ngourole accompagna le jeune homme
et lui apprit des chants. Chanter était
une chose que Yangabara maîtrisait mal,
mais il apprit à psalmodier
des textes sacrés
venant, selon
Ngourole, des
plus vieux esprits
des Ancêtres. Ce
qui plut le plus
à Yangabara fut
quand l'Ancien
lui montra des lieux jamais vus auparavant,
qu'il ne devait lui-même jamais révéler
aux femmes et aux garçons non initiés ; la
sanction pour cette désobéissance serait la
mort. (...)

La période d'initiation ne consista pas
uniquement dans la transmission d'his-
toires et de chants. Il y eut des jours dou-
loureux quand Ngourole coupa la peau
de la poitrine et des épaules du garçon et
introduisit des cendres fines et grises dans
les plaies qui par la suite deviendraient les
marques spécifiques d'un corps Banoubi.



La cicatrisation fut longue et pénible mais
Yangabara savait qu'il ne devait pas expri-
mer ses sensations douloureuses. Il voulait
devenir un vrai Banoubi.

L'Ancien expliqua que pendant toute l'an-
née après l'initiation Yangabara n'avait pas
le droit de regarder sa mère dans les yeux.
Yangabara se souvint que tous les initiés
devaient observer cette règle mais il n'en
comprit pas la raison.

Toute cette année, Ngourole resta loin
de Yangabara et le garçon dut trouver
lui-même sa nourriture. C'était la partie
de l'épreuve qui lui posait le moins de pro-
blèmes, Yangabara trouvait facilement des
baies, des noix, des insectes, des lézards,
des racines et il savait faire du feu en cas de
besoin. Il pouvait recueillir de l'eau dans
les troncs des arbres ou en creusant la terre
s'il était loin d'un ruisseau.

Quelques mois passèrent. Une cicatrice
se forma sur son épaule et sa poitrine. La
croûte tomba et Yangabara fut marqué à
jamais comme homme de la tribu Banoubi.
Mais il restait encore la plus douloureuse
partie initiatique. Tous les garçons – il y
en avait une vingtaine – revinrent du bush.
Une grande partie d'entre eux était pâle et
maigre, cette période les avaient affamés et
fatigués. Et maintenant, tous devaient se
soumettre au couteau de bois et réprimer la

tentation d'hur-
ler de douleur. La
circoncision est,
en elle-même,
une véritable
épreuve. Un ou
deux garçons
s'évanouirent
mais Yangabara
voulut montrer
qu'il était digne de devenir un homme. Et
il réussit. L'opération, pas très bien faite,
ralentit la guérison du pénis. (...)

Bien sûr, Yangabara ne pouvait avoir de
relations sexuelles pendant ces semaines
mais dans son état les filles ne l'intéres-
saient pas.

Enfin, Ngourole répéta l'interdiction
de regarder sa mère dans les yeux. Ah !
maintenant, il comprenait qu'il n'avait pas
le droit de retomber dans le rôle du fils, il
devait être un homme indépendant.

Flugi kun kakatuoj...

Elmaru aŭdis onidirojn pri la sukcesoj de sia favorato Jangabara kaj decidis, ke estas tempo por fari el li veran Banubi. Li sendis mesaĝon, ke la junulo venu sen la patrino al konata akvofalo. Samtempe aliaj Banubi-knaboj ĉe Ulgangulura ricevis similan mesaĝon. Ne estis sekreto, kvankam neniu laŭte diris ion : la knaboj submetiĝos al iniciĝo, kaj poste ili estos veraj viroj. La knaboj neniam atingis la akvofalon. Survoje oni simbole embuskis ilin, kaj ĉiu knabo estis aparte forkondukita de viro al malproksima parto de la Banubi-teritorio. Kio sekvos, estis timiga kaj ekscita sperto. La knabo, kiu eniris tiun vivetapon, devos eliri kiel plenrajta viro.

Jangabara estis forkondukita ne de Elmaru sed de multe pli aga viro nomata Ngurole, kies tuta hararo estis griza : sur la kapo, la vizaĝo, kaj la brusto. Ngurole estis zorge elektita de Elmaru. Li havis la oficialan honor-titolon Maljunulo, sed li ne apartenis al tiuj, kiuj vidis en Elmaru danĝeran ribelulon - kaj Elmaru neniam ŝtelis unu el liaj virinoj. Krome, Ngurole povis memori senfinajn kantojn pri nekredbla skalo da temoj, kaj oni tre respektis lian profundan konon de la instruoj de la Antaŭuloj.

Kiel batalanto Ngurole ne estis fama, sed Elmaru sciis, ke pri tio Jangabara ne bezonos instruon.

Ngurole akompanis la junulon kaj instruis al li kantojn. Kantado estis io, kion Jangabara ne faris bone, sed li lernis ĉanti sekretajn tekstojn transdonitajn, Ngurole diris, de la plej antikvaj spiritalaj Antaŭuloj. Pli plaĉis al Jangabara, kiam la Maljunulo montris al li lokojn neniam antaŭe viditajn, kiujn li mem neniam montris al virino aŭ neinicita knabo - la puno por malobeo estus morto. (...)

La periodo de la iniciĝo estis ne nur-transdono de rakontoj kaj kantoj.

Estis tre doloraj tagoj, kiam Ngurole tranĉis la brust- kaj ŝultro-haŭton de

la knabo kaj ĉovis fajnajn grizajn cindrojn en la vundojn, ke poste estiĝu la specifaj Banubi-korpo-ornamaĵoj. La cikatriĝo de tiuj vundoj estis malrapida kaj suferiga, sed Jangabara sciis, ke li devas ne esprimi dolorsentojn. Li volis esti vera Banubi-viro.

La Maljunulo klarigis, ke dum tuta jaro post la iniciĝo Jangabara ne rajtos rigardi rekte en la okulojn de sia patrino. Jangabara memoris, ke aliaj iniciĝoj devis observi tiun leĝon, sed ne komprenis ĝian motivon.

Dume Ngurole ofte restis for de Jangabara, kaj la iunulo devis trovi manĝaĵojn por si mem. Tiu parto de

la provado estis malplej problema ; facile Jangabara trovis berojn, nuksojn, insektojn, laceratojn, radikojn, kaj li sciis fari fajron por kuiri se necese. Akvo same ne estis problemo. Li sciis trovi ĝin en diversaj arbotrunkoj aŭ per fosado en la tero, se hazarde li troviĝis for de rivereto.

Kelkaj monatoj pasis. La cikatroj formiĝis ĉe liaj ŝultroj kaj brusto, la krusto forfalis, kaj Jangabara estis poreterne markita kiel viro de la tribo Banubi. Sed restis ankoraŭ la plej suferiga parto. Ĉiuj knaboj - estis eble dudek - revenis el la boŝo kaj renkontiĝis kun ĉiuj Banubi, kiuj ne estis ĉe Ulgangulura. Grandparte la knaboj estis palaj kaj tre maldikaj : ilia periodo en la boŝo estis malsatiga kaj tre peniga. Kaj nun ĉiuj devis sin submeti al ligna tranĉilo, kaj ili devis



subpremi la tenton kriegi pro doloro. Cirkumcido estas ja vere dolorona travivaĵo.

Unu-du knaboj eĉ svenis, sed Jangabara volis sin montri inda je viriĝo. Kaj li sukcesis. La operacio estis ne tre lerte farita, kaj lia penis bezonis longan tempon por resaniĝi. (...)

Kompreneble Jangabara ne povis amori dum tiuj semajnoj. Do li ne multe reagis, kiam Ngurole klarigis al li la leĝojn pri permesblaj amorkombinoj. Sendube li konsciis, ke li jam rompis la leĝojn, sed ĉar en la tiama stato lin ne interesis pensoj pri knabinoj, li aŭskultis silente.

Fine Ngurole ripetis la malpermeson, ke Jangabara dum tuta jaro rigardu rekte en la okulojn de sia patrino. Aha! Nun li komprenis : li ne rajtas refali en la rolon de filo, li devas esti sendependa viro.

Trevor STEELE, *Flugi kun kakatuoj*, pp.62-64. Aĉetebla ĉe libro-servo de UFE, 17 €

